

CxEa-RETKOMUNIKOJ estas neregula informilo de Cxehxa Esperanto-Asocio por cxiuj rete atingeblaj CxEa-membroj, sed ankaŭ senpage sendata al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri Esperanto-movado en Cxehxio. Gxi neniam enhavas aldonajxojn. Se vi tamen ne deziras ricevi ilin, sufcixas via mesagxo kun la teksto "Nesendadu" en la temlinio al <chrdle@kava-pech.cz> kaj ni tuj eligos vian retadreson el la dissendolisto.

ENHAVO

1. Invito al Pílský Mlýn kaj/aux Písek
2. Konferenco de CxEa alproksimigxas
3. Uzu la eblon trapasi la lingvan ekzamenon ILEI/UEA en Cxehxio
4. Limdato por kontribuoj al KAEST malantaŭ la pordo
5. Kontribuo de esperantistoj dum Expolingua 2006
6. Kongreso de AEH en Cxehxio
7. Cxehxa Esperanto-Junularo aktivas (regula rubriko)
8. Plia retpagxaro de cxehxa urbo en Esperanto
9. Anoncu vian eventon por la E-kalendaro!
10. Ekspozicio en Muzeo de Šumava
11. KELI-kongreso en montaro Krkonoše logas
12. Kontado de CxEa

1. Invito al Pílský Mlýn kaj/aux Písek
Jam ekde la 15-a de julio okazas la 28-a Internacia renkontigxo de E-Familioj en Pílský Mlýn apud Sedlice cxe Blatná, kiun partoprenas nauxdeko de partoprenantoj el 12 landoj. Kelkaj programeroj estas malfermitaj ankaŭ al publiko, do se vi logxas proksime aux libertempas en suda Bohemio, ankaŭ vi povas iom gustumi tiun parton de Esperantujo, nome: vendrede la 21-an de junio okazos en Pílský Mlýn TAGO DE LA LIBRO, kiun aktive partoprenos per kontribuoj posedanto de la eldonejo KAVA- PECH Petro Chrdle pri Esperanto-movado en Cxehxio kaj pri la eldona agado en Esperanto, Bert Schumann el Francio pri bildlingvo Bliss, sed ankaŭ unuopaj cxeestantoj prezentos legindajn librojn kaj de infanoj memfaritajn libretojn, etajn komiksojn, ktp. - marde la 25-an de julio ekde 14:00 okazos sur Urba Insulo en Písek KONCERTO de la REF-partoprenantoj (eniro senpaga). - vendrede la 28-an en Pílský Mlýn okazos ADIAUxA VESPERO dum kiu multaj partoprenantoj prezentos ION por amuzi la ALIAJN.

Prizorgi tranoktadon fare de la organizantoj jam bedaŭrinde ne eblas, do se vi venos de malproksime vi devas gxin arangxi memstare. La atingeblon kaj pliajn informojn pri REF vi povas trovi cxe www.ref.esperanto.cz aux vi povas voki organizantinon Pavla Dvořáková 774 942 424 (sed atentu ke en la feriejo ne cxie estas signalo, do vi devos esti iom pacienca).

2. Konferenco de CxEa alproksimigxas
Ne forgesu, ke la 11-a konferenco de Cxehxa Esperanto-Asocio okazos de la 22-a gxis la 24-a de septembro en la sudbohemia urbo České Budějovice. Informoj: jirka.tomecek@post.cz

3. Uzu la eblon trapasi la lingvan ekzamenon ILEI/UEA en Cxehxio Kiel jam anoncote, la internaciaj ekzamenoj ILEI/UEA cxi-jare okazos en Cxehxio ekde la 6-a gxis la 8-a de oktobro 2006, enkadre de Internacia Paroliga Semajno InPaSem <http://www.kava-pech.cz/inpasem> . Temas tamen pri aparta arangxo, kiun eblas partopreni ankaux sen neceso cxeesti la tutan InPaSem. Cxar ILEI akceptis nian proponon de rabatita kotizo (500 Kč) por la membroj de CxEA, CxEJ, SKEF kaj SKEJ (tamen NUR KAZE DE ALIGxO ANTAUx la 31-A DE AUxGUSTO), temas pri perfekta ebligo de gajno de internacia pruvo de viaj konoj de Esperanto favorepreze kaj sen neceso longe vojaĝxi. Pli da informoj: chrdle@kava-pech.cz

4. Limdato por kontribuoj al KAEST malantaux la pordo Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST 2006) okazos de la 10-a gxis la 12-a de novembro en Dobřichovice kun la cxeftemo Lingvo kaj interreto kaj alia temo Studoj de diversaj fakoj. Gxi okazos nur en novembro, tamen atentu, ke la plej favora eblo aligxi finigxas la 15-an de auxgusto kaj la limdato por sendi resumon (ne pli ol 50 vortan) se vi deziras prezenti kontribuajxon estas la 15-a de septembro 2006! Pli da informoj cxe <http://www.kava-pech.cz/kaest>

5. Kontribuo de esperantistoj dum Expolingua 2006 La 10-an kaj 11-an de novembro okazos en Nacia Domo (Národní dům) en Prago-Vinohrady la 16-a internacia foiro de lingvoj Expolingua

6. Kongreso de AEH en Cxehxio La 5-a kongreso de Asocio de E-handikapuloj kun sia Internacia klubo okazos de la 30-a de majo gxis la 3-a de junio 2007 en Juniorcentro SEČ - cxe la bordo de akvovalbarajxo apud la rivero Chrudimka (proksimume 25 km de la urbo Pardubice). Dum la kongresa konferenco okazos balotado por la nova komitato. Aligxu, kiu volas aktive kunlabori kaj levi la asocion EH al pli alta nivelo. Kiu volus prezenti ian interesan prelegon, kulturan, muzikan aux amuzan prezentadon, skribu al aei-ikeh@volny.cz.

Ni uzu la okazon rememorigi la altkvalitajn lingvajn seminariojn de EAH en Skokovy cxiam dufoje jare. La plej proksima okazos de la 16-a gxis la 22-a de oktobro cxi-jare. Informoj cxe: aei-ikeh@volny.cz

7. Cxehxa Esperanto-Junularo aktivas (regula rubriko)

Inter la 8-a kaj 11-a de julio 2006 okazis en Velehrad internacia renkontigxo de CxEJ, kiun cxeestis 16 gejunuloj el Cxehxio, Slovakio kaj Hungario (inter ili 9 membroj de CxEJ). La renkontigxo okazis kadre de la 59-a kongreso de IKUE (Internacia Katolika Unuigxo Esperantista), kun kiu gxi ankaux kunhavis kelkajn programerojn.

En Velehrad kunvenis la 8-an de julio vespere ankaux jam la 2-a gxenerala asembleo de CxEJ, kiu elektis la novan estraron de CxEJ. La

nova prezidanto farigxis Marek BLAHUŠ, vicprezidantino estas Dáša CHVÁTALOVÁ kaj kasistino Aneta MURSWIEKOVÁ. La asembleo ankaux aprobis kelkajn sxangxojn en la statuto, laux kiuj ia. la suba limo por ordinara membreco sxangxigxas el 15 al 10 jaroj. Cxefa punkto de nova agadplano estas decido priesplori kandidatigxon de CxEJ por okazigi en 2008 en Cxehxio la 64-an Internacian Junularan Kongreson (IJK) de TEJO.

CxEJ farigxis cxehxa distribuanto de la DVD "Esperanto Elektronike" eldonata de E@I (la kreinto de projektoj kiel "lernu!"). La DVD (komputila disko simila al kompaktdisko, sed entenas pli da datumoj) celas esti la plej bunta kaj plej ampleksa esperantajxo iam ajn. Gxi enhavos cxion bezonatan por varbi pri esperanto, lerni kaj utiligi gxin. Detalaj informoj trovigxas cxe www.esperantodvd.net. CxEJ antauxmendis 100 ekzemplerojn kontraux avantagxa prezo po 60 Kč por peco. Interesigxantoj bonvolu turni sin al cxej@blahus.cz. Detalaj kaj aktualaj informoj pri cxehxa junularo cxiam troveblas cxe <http://www.esperanto.cz/cej>

8. Plia retpagxaro de cxehxa urbo en Esperanto

Jen la nova pagxaro de la sudbohemia urbo Netolice en Esperanto:

http://www.netolice.cz/esp_index.htm

kaj ecx de la mikroregiono Netolicko, en kiu la plej elstara interesajxo estas la kastelo Kratochvíle:

http://www.netolice.cz/netolicko/esp_index.htm

Tradukojn en Esperanton de ambaux pagxaroj provizis Vladimír Türk.

9. Anoncu vian eventon por la E-kalendaro!

En la venontaj CxEA-retkomunikoj (probable en septembro) ni planas aperigi denove E-kalendaron de cxiuj E-eventoj en Cxehxio kaj proksima cxirkauxajxo gxis la fino de la jaro kaj en venonta jaro.

Organizantoj de E-arangxoj do estas petataj sendi la informon, kiu enhavu la nomon de la evento, lokon, datojn, retadreson, kie eblas ricevi pliajn informojn, kaj aligxilojn (se ekzistas ankaux retpagxon de la evento) kaj eventualan mallongan karakterizon al la retadreso chrdle@kava-pech.cz.

10. Ekspozicio en Muzeo de Šumava

En muzeo de Šumava en la urbo Sušice estas jam ekde la 1-a de julio Ekspozicio de prospektoj de muzeoj el la tuta mondo kun la titolo "Muzeoj - trezorujoj de la mondo". La prospektojn la muzeo akiris danke al la eksterlandaj Esperanto-klubo. La ekspozicio estas kompletigita per informtabulo pri Esperanto kaj gxia uzeblo kun la titolo "Esperanto a internet". Gxi enhavas kelkajn interesajn elprintaĵojn de retpagxo, ekz. tiuj de CxEA, Pelmelo, Vikipedio, Internacia TV, EsperantoLand, sed ankaux estas prezentitaj la Esperanto-retpagxo de la muzeo de Šumava kaj specimenoj de la kurso de Esperanto. Cxio cxi realigxis danke al fervora laboro de la oficisto de la muzeo s-ano Jiří Pěnek. La ekspozicio estas vizitebla gxis la fino de septembro.

11. KELI-kongreso en montaro Krkonoše logas

Dum la tagoj 12. - 19. 8. 2006 okazos en Strážné (Horský domov)
56-a kongreso de KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia). Jen el
la programo: dimanco 13. 8. - 9.00 Ekumena diservo kaj malfermo de
la kongreso (evang. pregxejo Strážné), 9.30 Koncerto de Tomáš Najbrt
(diversaj malnovaj popolaj muzikiloj), mardo 15. 8. - 19.30 koncerto
de geedzoj Jelínek (piano+kanto), jxaukdo 17. 8. - 17.00 orgena
koncerto de prof. Ernst Leuze (DE) en Klášterní kostel en Vrchlabí

12. Kontado de CxEA.

Mi urgxe sercxas personon kapablan metodike helpi/konsili pri kontado
de negajnaj (kotizaj) organizoj. Bonvolu kontakti min. Vratislav
Hirš, kontisto de CxEA: hirs@gm.vyskov.cz